Universala Esperanto-Asocio

AKTIVULA MATURIGO

Estrara Subteamo: MOVADO

*Estrara Komuniko EKO 2017-05 sendita el Kutaisi, la 1an de aprilo.*

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo (kun fontagnosko) inkluzive de la alkroĉaĵoj.

# Kaŭkaza flamo lumigita

Ardas la etoso en la jubilea deka Mezorienta Kunveno (MK) en Kutaisi, la dua plej granda urbo en Kartvelio. Tie en iom izolita urboranda kongresejo apud bela parko ariĝis modesta kvanto da esperantistoj el mirinda gamo da landoj, ĉiu kun deziro ricevi atenton kaj fortigi la movadon en ĉi tiu mondparto, konata en UEA laŭ la mallongigo MONA (Meza Oriento kaj Norda Afriko).

Antaŭ deko da horoj la aranĝon malfermis per bonvenigaj vortoj de la enlanda organizanto Nana Ĥizambareli; sekvis la saluto de la vic-prezidanto de UEA, kiu rakontis pri la kontinentaj kongresoj, kiujn UEA iel nun reformas al strukturo kiu pli facile enprenus la serion de Mezorientaj Kunvenoj. La sekva saluto venis de Renato Corsetti, iama prezidanto de UEA kaj nuna ĉefa prizorganto de la regiono MONA. Kvara alparolo venis de Murat Özdizdar el Turkio, kiu partoprenis la MK-ojn de la komenco, kaj devove alvenigis junajn studentojn. Kaj la publiko: tridekkvino da homoj el Belgio, Britio, Germanio, Hispanio, Hungario, Irano, Italio, Japanio, Kartvelio, Kazaĥio, Rusio (inkluzive de la respubliko de Dagestano), kaj Turkio -- kaj espereble Nederlando. Raportisto de loka ĵurnalo intervjuis kelkajn personojn.

Antaŭ naŭo da horoj estis malfermita la 31a seminario pri Aktivula Maturigo (AMO) per rapida klarigo de ĝiaj celoj, ekzistokialoj, kaj partoprenigaj labormetodoj. Tion la kunvenintoj rapide poste povis tuj sperti, per plenumo de FLAM-analizo. Paralele kun tiu seminario funckiis kurso por komencantoj sub gvido de Anna Lowenstein, kiu arigis dekon da lernantoj.





Do, restis 24 personoj por la komenca sesio de AMO. Post klarigo pri la principoj de FLAM-analizo, Renato Corsetti donis tre valoran resumon pri la stato de Esperanto en landoj de la regiono sub diskuto, ekzemple en Tunizio, Alĝerio, Maroko, Jemeno, Emiratoj, Jordanio, Sirio, Libano, Irano kaj landoj kun pli forta organiza stato kiel Israelo kaj Turkio. Inter la landoj sen konataj esperantistoj li menciis (nesurprize) Sudanon kaj Libion. Laŭ tiu superrigardo la homoj eniris kvar grupojn. Unu listigis la fortojn de la esperantistaro, dua la lamaĵojn aŭ malfortojn. La tria kaj kvara grupo devis listigi la pli vastajn sociajn, politikajn kaj ekonomiajn faktorojn, kiuj por la disvastigo de Esperanto estos Avantaĝaj kaj kontraste Minacaj. La rezultojn vi legas sekvapaĝe kune kun bildoj de la seminarianoj diskutantaj.



La programo de la 10a MK kaj la AMO-seminario pluiros en la naskiĝinta tago, kun densa programo de prelegoj kaj prezentaĵoj. Fine de sabato okazos la dua parto de la FLAM-analizo, en kiu oni tiros konkludojn el la farita analizo kaj proponos konstruajn solvojn laŭ la principaro EKEK, kiun ni klarigos en la sekva komuniko. Sesio en la lasta seminaria tago dediĉiĝos al kompilo de rekomendoj kaj planoj por konkretigi la konstatojn de la nuna kunveno.

Kutaisi, teksto finita 01.15 h, loka tempo.



Fotoj: SMG

Vortoj (sen la FLAM-rezultoj: 450)
==========================

# FLAM-analizo: la sesa

Temo de la analizo: Progresigo de Esperanto en la seminaria regiono

## FORTOJ

- Solvo en multlingva regiono.
- Lingvo sen poseda lando.
- Firmigilo por translimaj mondperceptoj.
- Turismo – solvoj per Esperanto.
- Komerca agado per Esperanto.
- Tutmonda E-komunumo.
- Lernfaciliga efiko.
- Pontolingvo kultura.
- Rekonata kiel literatura lingvo.

## LAMAĴOJ

- Malfacilecoj renkontiĝi kaj kontaktiĝi.
- Manko aŭ modifegoj de E-historio en la regiono.
- Malabundo de bonaj informiloj, retejoj ktp.
- Lingva diverseco – multaj lingvoj servendaj.
- Limigitaj tradukoj el la regiono.
- Nemultaj aŭ nekonataj kulturaj produktoj.
- Malfacilecoj konigi la E-kulturon.
- Malmulteco de kapablaj gvidantoj.
- Plia emo eniri la komunumon ol en la movadon.

Vortoj entute: 715
======================

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe:
<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj ĉe:
http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado

## AVANTAĜOJ

- Granda evoluo de la reto – demokratigo de komunikado.
- Aliancoj estas la agantoj por lingvaj rajtoj – similideanoj.
- Mildigo de vojaĝkostoj por aliri renkontiĝojn.
- Lingvo-lernemo – propedeŭtika valoro.
- Bezono por logika kaj problemsolva pensado.
- Sopiro je pli kontentiga turismo.
- Senperforta lingva disvastigo.

## MINACOJ

- Militoj, diktaturaj regantoj.
- Politikaj malpacoj inter landoj – vojaĝlimigoj.
- Bremsado de komunikebloj.
- Nefortaj ekonomiaj cirkonstancoj.
- Ne-egalrajteco por virinoj en kelkaj landoj.
- Misinfluo de grandaj lingvoj.
- Neapliko de modernaj rimedoj.
- Antaŭjuĝoj pri Esperanto.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>.
Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al
Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.